FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE

C.c.p. Association Catholique Française pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

====== la nº: 2,50 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. ======

xxxx

PASKO

Sinjoro, estu laùdata
Por
En tiu nokto
Ĉion renovigi.

Estu laùdata
Ankaù por donaci al ni
La freŝon de aùroro
Kiu refaras niajn vivojn.

Estu laùdata
Por konservi
En via paco
Niajn pezigitajn korojn.

Estu laùdata por renaskigi
Vian ĉiaman amon,
Kvazaù vi amus nin
Por la unua fojo.

Estu laùdata, Sinjoro,
Por esti nia paco,
Nokte, tage.

wwww

LINGVA ANGULO

Kontribuis en la lastaj tradukoj: S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DEGRELLE (De), GUILLON (G), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M). Jen iliaj proponoj

1. emboîter le pas: eksekvi (B, Da), postpaŝi iun (B); paŝi en/laŭ alies paŝoj(n), paŝon post paŝo sekvi iun, sekvi iun laŭpaŝe (De); blinde eksekvi (G); eksekvi laŭpaŝe, laŭopinie modeliĝi, opinie konformiĝi (L); tuj postpaŝi (M).

2. s' effondrer comme un château de cartes: disfali kiel kastelo el ludkartoj (B); diseriĝi kiel kartokastelo, renversiĝi kiel kartoskafaldo, kartoskafalde renversiĝi (De); disfalegi (G); disfali kiel ludkarta konstruaĵo (L); disrompiĝi kvazaŭ kartkastelo (M).

3. un empêcheur de tourner en rond: ĉikanisto, malglatigisto (B); ludentrudulo (Da); ĝojmalamiko, dancomalamiko, festofuŝisto, dancofuŝisto (De); kontraŭdiremulo (G); ĝenulo, entrudulo (L); ludfuŝanto (L, M); malgajigulo (M).

4. enlever le pain de la bouche: senigi je la vivpano (B); kvazaŭ forpeli la panon el la buŝo (Da); forpreni la manĝon de iu, elbuŝigi/forpreni ies panon (De); ŝtelpreni la laboron de aliulo (G); maldungigi, malhavigi (al iu) vivrimedojn (L); forpreni necesaĵon de iu (M).

5. un ennemi juré: nepardonema/ ĉefa malamiko (B); ĵurmalamiko (De, L); ĵurligita / deklarita malamiko (De); obstinega malamiko (G); atestita malamiko (M).

6. s' entendre comme larrons en foire: interkonsenti kiel paro da friponoj (Da); mirinde interkonsenti (De); interkonsenti same kiel amuziĝantaj ŝtelistoj (G); tutkonsenti por fiagi (L); akordiĝi kiel diboĉetuloj (M).

7. un enfant de la balle: denaska komediisto (B, De); denaske trejnita aktorido (B); persono edukita laŭ la profesio de sia patro (Da); posteulo heredonta la patran metion (G); hereda/migra spektaklisto (L); denaske formita komediisto (M).

8. il va en entendre pour ses quatre sous: li estos skoldata kiel decas (B); li tuj aŭdos mian malestimon pri li (Da); ĝissate li estos riproĉadmonita, li aŭdos pri mi (De); li estos admonata/ riproĉata, kiom li meritas (L); li estos riproĉata laŭmerite (M).

9. faire entendre raison: prudentigi (B);inciti al saĝeco, komprenigi al iu lian eraron (Da); finfine konvinki, konvinke persvadi (De); saĝigi, admoni al saĝo (L); admone prudentigi, akceptigi ion saĝan (M).

10. s' entourer de garanties: sin ŝirmi per garantioj (B); multobligi siajn garantiojn (Da); asekuri sian estontecon, eliron, finon, ĝisfine sin garantii (De); certiĝi pri garantioj (G); sin ŝirmi per garantiaĵoj (L); certigi al si garantiaĵojn (M).

Jen la dua klasifiko por 1978: 1) S-ino MICHAU (16 p.); 2) S-ro LE MARQUAND (14); 3) S-ro BOURGOIS (8); 4) S-ro GUILLON (6);5) en egaleco: S-roj DAUCHEZ, DEGRELLE, de SALVO kaj FARDET (5).

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois: 1) un caractère à l' emporte-pièce; 2) dire entre quatre yeux; 3) entrer en coup de vent; 4) envoyer à tous les diables; 5) envoyer dans les décors; 6) épater la galerie; 7) une épée à deux tranchants.

proponoj de S-ro Guillon: 8) renvoyer la balle; 9) cela lui fait une belle jambe; 10) faire des gorges chaudes.

N. B. Kelkaj proponitaj tradukoj ne aperas ĉi supre, ĉar ili estis gramatike nekorektaj.

wwww

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 5-a DE MARTO 1978.

Ĉeestas: Pastroj BOURDON kaj DEGRELLE, S-inoj MICHAU kaj VINCENT, F-inoj PREUX kaj VANNEAU, S-roj COLAS, DESPINEY kaj VILLENEUVE.

Petis senkulpigon: F-to MARMOU, S-roj BESSIERE kaj VERON.

Post la preĝo "Patro Nia", la komitato ekstudas la tagordon.

1. PREPARADO DE LA KONGRESO EN TOURS (15-17 APR 78)

La sekretario montras la laboron jam faritan de nia amiko S-ro Lecocq.

La komitato detale analizas la programon de la kongreso kaj decidas aldoni specialan numeron de nia bulteno por anonci la lastajn precizigojn (temo studota, voĉdonado...)

2. TUTLANDA KONGRESO EN CLERMONT-FERRAND (14 MAJ 78)

Oni decidas organizi fakan kunvenon por la katolikaj kongresanoj. La sekretario de FKEA tiurilate skribos al la sekretariino de UFE.

Pri la kongresa diservo, ni denove rilatos kun Pastro Berger, kiu ekklopodis por efektivigi tiun ceremonion.

3. FRANCLINGVA ELDONO DE LA VERKO DE PASTRO KORYTKOWSKI

Pastro Bourdon nun estas en rilato kun eldonistoj kaj donos pliajn informojn pri la eldonkostoj en Tours.

4. INFORMADO KAJ VARBADO

Substrkinda estas la agado de S-ro Poly, kiu vizitis ok paroĥojn, disdonante 620 ekzemplerojn de nia informfolio "Jeune Chrétien".

La komitatanoj ĝojas pro la rapida kaj bona studado de Esperanto de Pastro Schneider, paroĥestro en St-Clément apud Sens. Nun li instruas siajn mesoservantojn. Li provas rilati kun germana pastro, kiu same agas.

Nia sekretario legas kortuŝan leteron de F-to Alfonso Augen, trapista esperantisto, kiu subtenas la laboron de nia asocio per siaj preĝoj.

5. IKUE kaj IKEK

Pastro Degrelle raportas pri IKUE substrekante la neceson aboni la revuon "Espero Katolika" por subteni la internacian katolikan movadon.

Pri IKEK, li anoncas, ke jam aliĝis 25 geknaboj el diversaj landoj. Kun helpo de pola komponisto, li verkis himnon por tiu infana asocio.

6. DIVERSAĴOJ

S-ino Vincent raportas pri du movadoj: "l' Ilot" kaj ARPE.

Nia sekretario parolas pri sia korespondado kun F-tino Marie de la Trinité en Flavigny.

Fine, ĉiuj "ĝis revid"-umas pripensante nian kongreson en Tours.

Protokolis: Roger DESPINEY.

wwww

SOLVOJ



P1



P2



P3

PROBLEMOJ



P4

P4.- per la tri pecoj, faru la jenan françan literon. **Y**

P5.- per la kvin pecoj, faru kwadraton.

P6.- per la kvar pecoj similaj, faru kvadraton.

P5



P6



RELEVIĜO

Releviĝo; jen Kristo nova.
Glorbelece ekfulmas lumo
Tra la mondo en maksimumo:
Por l' homsavo feliĉon kova.

Al sinaja Moseo prova
Nun golgotas finrespondumo.
Releviĝo: jen Kristo nova.
Glorbelece ekfulmas lumo.

Ĵus alpaŝis sen ĉaro mova
Nov-Elijo al savkrucumo.
Homo, vidu: en sunkostumo
Venksinjoras Savanto pova.

Releviĝo: jen Kristo nova.

Roger DEGRELLE (8/1/78)

xxxx

Vi deziras celebri la mirindaĵojn de la dia amo kune kun la tuta kristana popolo en preĝejo aŭ kapelo malfermita al ĉiuj. Vi ne volas esti fremdaj al la geparizanoj, kiuj venos preĝi kun vi .

Fine via profesia laboro estos por vi ne nur vivrimedo, sed efektiva partopreno en la vivo de la urbanoj kaj en la taskoj de la urbo...

Tiu projekto estas originala kaj respondas al la deziro de la Kardinalo vidi la kreadon de preĝocentroj adaptitaj al la spiritaj bezonoj de la homoj vivantaj aŭ laborantaj en Paris. Sekve, vi povas ĝin realigi humile, en via loko, en la Eklezio de Paris. En epoko en kiu la virino konsciiĝas pri sia misio en la mondo alimaniere ol nur kiel edzino kaj patrino, la aŭtonomeco de via vokiĝo aperas kiel kriterio pri aŭtenteco. La dialogo inter viroj kaj virinoj, kiuj daŭrigas la saman spiritan eksperimenton estos despli fruktodona en la Eklezio, ke ĉiu alportos al ĝi sian tutan propran riĉecon. Laŭ via maniero vi devas servi la promocion de la virino en societo, kiu ankoraŭ ne redonis al ŝi ŝian plenan lokon..."

Kaj la letero konkludas:"Sekve, mi konfirmas vin sur tiu vojo, preĝante kun vi por ke la Spirito de l' Sinjoro donu al vi sian ĝojon kaj igu vin partopreni en Lia forto, kiu ebligos al vi la alfrontadon al la malfacilaĵoj."

La Sinjoro bonvolu helpi nin esti gefratoj ĉefe kontemplantaj, travivantaj novan specon de monaĥismo, en la Urbo.

"La homa socio donas sian plej belan frukton, kiam ĝi estas kronita de la kontempla soleco de kelkaj puraj animoj, kiuj, siavice, puŝitaj de la amo, propetas por la amaso."

Jacques MARITAIN.

*

MONAĤOJ EN LA URBO

"Vi ne elektis min, sed mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu frukton, kaj ke via frukto daŭru." (Johano XV, 16).

Ĉu monaĥa frataro en la koro mem de Paris?

En tiu "dezerto" de soleco, angoro, serĉado, indiferento, anonimeco, solidare kun la hodiaŭa homo tia, kia ĝi estas, ni volas provi krei oazon. Naski lokon por silento kaj preĝo, kiu estu samtempe ejo por akcepto kaj partigo. Loko de bonvolo, kie la vivo pli gravas ol agado kaj parolado. Loko de paco, kie ĉiu povos esti akceptita, kia ajn estu ĝia medio, aĝo, mentaleco, por tiu serĉado de Dio, kiun ni ĉiuj avidas.

En la centro de areo limigita per la kajoj, la insulo S-ta Ludoviko, la Marĉo, la Centro Beaubourg, la Urbdomo, la Bazaro de l' Urbdomo kaj la estonta Forumo de la Haloj, en la nomo de la pariza eklezio, kiu konfidas al ni tiun mision pere de Kardinalo Marty, ni volas el la preĝejo S-ta Gervazo fari lokon de kontemplado, kie en la tri ĉefaj tagtempoj ni kantos la "monaĥajn horojn" kaj ĉiuvespere celebros l' eŭkaristion.

Ni estas jam dudeko firme decidintaj laŭiri tiun vojon kaj pli ol tridek dezirantaj sekvi tiun saman direkton. Kvar el ni estas sacerdotoj, el kiuj unu episkopo, ĉiuj aliaj laikuloj. Vidante, kion la Sinjoro volis fari pere de ni kaj preskaŭ spite de ni depost novembro 1975, ni povas nur danki kaj inviti vin tion fari kun ni.

La kerno de nia klopodo kuŝas en tiu simpla frazo de Jesuo konservita en S-ta Johano:"Patro, mi petas, ne ke vi forigu ilin el la mondo, sed ke vi gardu ilin kontraŭ la malbono." (XVII, 15).

Ni volas esti en ĉi tiu mondo por esti kun ĝi kvankam ne estante de ĝi. Vivi en ĝi por kompreni kaj tiel pli bone povi diri; vivi en ĝi por komunii kaj tiel povi ami; vivi en ĝi por kontempli la Patron kaj nome de ĉiuj propeti kaj laŭdi. Kiel Jesuo, la unua el ĉiuj monaĥoj, tion faris. Kiel Maria, la plej granda kaj tutunua monaĥino, tion travivis.

Sekve ni estas tie "por serĉado de Dio sola", sed en solidareco travivita kun la homo, iom sammaniere kiel la Dek du spertante la fratecon de la sama aŭskultado, sama irado, sama enprofundiĝo kaj sama maturiĝo ĉirkaŭ Kristo. Serĉado de Lia ĉeesto ĝis en la signoj de tiu ĉi tempo, en la irado kaj evoluado de nia historio, en kiu loĝas la Filo kaj kiun gvidas la Spirito. Por memorigi al Li ĝian profundan signifon kaj la Lastan Esperon.

Kontemplantaj kaj solidaraj, atestantoj de Lia veno kaj atentaj je la promeso de Lia reveno, nia "religia konsekrado" de nun enirigas nin en la servadon, dependecon kaj laŭdadon.

Farante mem kaj ne forkurante de ĝi al la kamparo, la eksperimenron pri la malfacilaĵoj, aliproprigoj, luktoj, laboro, devigoj, laceco, bruo, malpurigado, ĉagrenoj kaj ĝojoj, peko kaj sankteco, de tiu Parizo, kie vivadas dek milionoj da homoj, niaj fratoj, ni dezirus povi efektivigi tie, kun ili, en nia eta loko, sed reale, "la avangardajn signojn antaŭantajn la regnon", samtempe en apartiĝo kaj komunio, en soleco kaj partigo.

Unu el la plej gravaj faktoj de nia tempo estas sen ia dubo la urba fenomeno. Tial ni estas nek benediktanoj, nek trapistoj, nek karmelanoj, nek dominikanoj... Ni estas "urbanoj."

Sekvante la Patrojn de la unuajn kristanaj jarcentoj, kiuj iris al la dezerto "por batali kontraŭ la diablo" kaj klopodi tie trovi Dion, ni volas niavice iri al la "dezerto" de la moderna urbo por batali kontraŭ ĝiaj miraĝoj, ĝia eta nesatigebla soifo, ĝia soleco, kaj por kantigi ĝiajn verajn belojn, aspirojn kaj profundajn valorojn "kiel glora laŭdo." Por tie esti mem samtempe purigitaj je nia peko kaj sanktigitaj per ĝia vivo. Meti nian preĝon en la urbon kaj la urbon en nian preĝon. La homo ne havas pli utilan aŭ pli belan taskon plenumotan ol la kontempladon.

Fakte ni ne povas lojale laŭdi la Majstron de l' Universo ne interesiĝante je Lia universo, foriri post la Filo de l' Homo ne serĉante Lin en la koro de l' homo, kie Li enkarniĝis, kaj vivi nian hodiaŭon ne atentante tiun hodiaŭon, kie blovas la Spirito. Ni ne devas kontempli Dion aŭ agi por la homo, ni devas unuigi la kontempladon kaj la partigon. "La du amoj." Vidi Dion sola (monos) sed por vidi Lin kun ĉiuj kaj tion diri al ĉiuj per la simpla kaj nuda atesto de nia vivo de preĝo, silento, solidara laboro, frata amo kaj liturgia partigo.

La serĉado de Dio, "sola necesa", pasas tra la homo, ĉar la homo estas "bildo de la Patro", "Korpo de Kristo" kaj "templo de la Spirito". En ĉi tiu mondo, kie ĉio forpasas, "Dio sola sufiĉas", sed Dio mem metis sin en la mondon kaj lokis nin tien. Se Paris estas "Babel", ĝi estas ankaŭ "Sankta Urbo". La Sinjoro loĝas en ĝi kaj ni volas tie Lin kontempli.

La Sinjoro bonvolu helpi nin esti fratoj ĉefe kontemplantaj, vivantaj kiel novaj monaĥoj, en la urbo.

Monaĥa frataro de S-ta Gervazo
30, rue Geoffroy l' Asnier
75004 - PARIS

HORTABELO DE LA DISERVOJ

ĉiutage: 6.30 Silenta preĝado komencante per kanto al la Sankta Spirito
7.00 Kanto de Laŭdoj (sabate kaj dimanĉe preĝado je la 7.30; laŭdoj je la 8.00
12.30 Tagmeza diservo
17.30 Enkonduko al la preĝo (silento kaj orgeno)
18.00 Kanto de vespro (escepte dimanĉe)
Eŭkaristio

dimanĉe: 8.00 Diservo de la Releviĝo
17.00 Ĉefa diservo

lunde: Tiu tago estante por ni tago de dezerto ekster Paris, neniu diservo okazos

Enirejo al la preĝejo: placo S-ta Gervazo kaj 13, rue des Barres.

Subtera vagonaro: Hôtel de Ville kaj Pont-Marie

DIO BONVOLU AKCEPTI VIN TIE EN SIA SILENTO KAJ PACO!

wwww

INFORMBUKEDO (daŭrigo)

5. La 10-an de septembro 1978, pilgrimtago al Nia Sinjorino de Banneux apud Liège (Belgujo). Temo: "De malbono al feliĉo, per Kristo kaj Maria." De la 9.30 ĝis la 17.00. Informas Pastro Louis BOURDON.

6. La Katolika Esperanto-Centro "Don Ferdinando Longoni" str. San Antonio 5 20100 MILANO (Italujo) organizas ĉiumonatan Esperanto-diservon. La lasta okazis la 15-an de aprilo.

==========

MONDCIVITANOJ.

Dank' al la senlacaj klopodoj de nia samideanino S-ino GAYMARD-ROLLET el Var, la Asocio de la Mondcivitanoj adoptis Esperanton kiel laborlingvon por siaj kongresoj. La mondcivitanoj, kiuj fakte strebas al mondanista edukado kaj tutmondaj institucioj, nepre devas havi komunan lingvon. Ĉar la esperantistoj jam havas tiun monglingvon, ili ĉiuj devus esti mondcivitanoj.

Ĉu vi mem, kara leganto, estas mondcivitano? Ankoraŭ ne ? TUJ petu vian registradon ĉe la Internacia Esperanto-Centro de la Mondcivitanoj 8, rue Rouget de l' Isle 30000-NÎMES. Se via(j) alilanda(j) korespondanto(j) ankaŭ ne estas mondcivitano(j), instigu lin/ilin tuj peti sia(j)n karto(j)n ĉe la sama adreso.

++

KOTIZTABELO 1978

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 44 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

****

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 10 F
infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . 5 F
Membro bonfaranto . . . . . 50 F
Dumviva membro . . . . . 200 F

UFE kun "Revue Française" . . . . . 80 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 110 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 35 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

++

Dépôt légal: 2ème trimestre 1978 //// Polycopié par F. M. C.
Papier de presse nº 34 745 XXX Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
Directeur-gérant: Gaston VERON //// 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE

Lastmomente : KONSILIA KUNVENO
Jaŭdo (Ĉieliro de Jesuo) la 4-an de majo, je la 10-a, ĉe UFE-sidejo en Paris, 4 bis, rue de la Cerisaie .
Iu ajn povas ĉeesti kiel observanto.

***